

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. La luno nun leviĝis,  
La steloj eklumiĝis,  
Subiĝis jam la sun'.  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel  
Hejmeca ĉambro, tiel  
Trankvila estas ĝi.  
Dormante ĉiun penon,  
Aflikton kaj ĉagrenon  
Dum nokta hor' forgesu vi.<sup>2</sup>

3.) Jen staras ĉe l' ĉielo  
Tre eta fora stelo,  
Sed tamen egas ĝi!  
Ja estas ofte aĵo  
Por ni nur ridindaĵo;  
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

...

---

<sup>2</sup> alia versio:

2.) Ah, kiel trankvileca  
La mondo kaj hejmeca  
Vespere estas ĝi!  
En tiu kalma paco  
Ekdormu vi pro laco,  
Forgesu la aflikton vi!

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Adolf Burkhardt*

1. Leviĝas luno; hele  
orpompas surĉiele  
la steloj al l'okul'.  
Arbaro mute revas;  
el la herbej' sin levas  
mirinde blanka la nebul'

2. Ripozas mont' kaj valo  
sub la krepusk-vualo  
trankvile kvazaŭ lag'.  
Por vi jen la permeso  
fordormi en forgeso  
la malbonaĵojn de la tag'.

3. La luno nur duone  
Prezentas sin impone;  
ĝi tamen estas sfer':  
Facile ni priridas  
aferon, se ni vidas  
nur parton de la plena ver'.

...

4.) Ni homaj fieruloj,  
Mizeraĵoj ni pekuloj,  
Malmulton scias ni!  
Ni faras multajn aĵojn  
Kaj artajn elpenaĵojn,  
Sed vana estas tio ĉi.

5.) La Dian savon vidu  
Ni nur kaj ni ne fidu  
je vanta iluzi'!  
Ni malfieraĵoj iĝu,  
Ni ĝojoj kaj piŝoj,  
Infan-egalaj estu ni!

6.) Finfine vi nin prenu  
El tiu mond', ĉagrenu  
Ni ne pro tio ĉi!  
Kaj kiam vi nin prenos,  
Ho faru, ke ni venos  
En vian regnon, kara Di'!

7.) Gefratoj, enlitiĝu,  
Trankvile endormiĝu!  
Noktiĝas ĉie ĉi;  
Vin gardos nia Dio.  
Li regas super ĉio.  
Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!

...

4. Homidoj ni fieraj  
pekuloj nur, mizeraĵoj;  
ne multon scias ni.  
Ni teksas iluziojn  
kaj serĉas multajn sciojn  
kaj devojiĝas pli kaj pli.

5. Ho Di', nin lasu vidi  
la Savon, ne plu fidi  
vantaĵojn de l' pasem'!  
Nin faru simpl-animaj,  
infane Dio-timaj  
en ĝoj', jam nun sen zorga trem'!

6. Vi fine, sen ĉagreni,  
el mond' nin volu preni  
per milda morto for.  
Nin tiam al ĉielo  
venigu, al la celo:  
Vi, nia Dio kaj Sinjor'!

7. Gefratoj, nun ekkuŝu!  
Vin nokta vent' ne tuŝu,  
dum ŝirmas anĝelar'.  
Indulgu, Di', nin grace,  
por ke nun dormu pace  
ni kaj malsana la najbar'.

...

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1989-09-10.*

*MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-03-26 13:19:45)*

*Tiu ĉi traduko estas unue publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", numero 6/1984, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", paĝo 15. Enigis ka tekston de la traduko la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen. Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en 2007-03-26 nur la duan strofon, kompare al la teksto aperinta en "Esperanto aktuell 6/1984".*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, \*1929-04-10 – †2004-04-02).*

*Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la kant-libreto "Mia kantaro I", dua eldono de Majo 1998, kompilita kaj eldonita de s-ro Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. Sinjoro Josef Schiffer donis al mi la permeson.*